

Eŭropa Bulteno

Decembro 2006, № 11 (53)

De la redakcio...

SKRIBU AL AVO FROSTO, LI RESPONDOS... ANKAŬ EN ESPERANTO!



**MONTREALO, KEBEKIO,
KANADO,**

Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Denove ĉi jare la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frosto ricevos respondon en Esperanto.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estas inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj liaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto.

Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

**AVO FROSTO NORDA POLUSO HOH OHO KANADO -
CANADA**

BRATISLAVA KONFERENCO PRI PERSPEKTIVOJ DE LINGVA POLITIKO



En la slovaka ĉefurbo Bratislavo okazis la 24an kaj 25an de novembro 2006 internacia konferenco »**Perspektivoj de lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en EU**«. Organizis ĝin Eŭropa Domo de Bratislavo nome de la slovaka registaro kaj kadre de la ŝtatkunlaboro de la t.n. Viŝegradaj landoj. La konferencon malfermis vicprezidanto de Slovakio, sinjoro Dušan Ĉaplovič, kaj parolis ankaŭ dum la malfermo sinjoro Peter Benuška, prezidanto de Eŭropa Domo, Andrea Elšekova – Matisova reprezentantino de Eŭropa Komisiono en Slovaka Respubliko kaj Zuzana Hruščova el Ministerio por edukado.

Partoprenis cento da partoprenantoj el deko da landoj: krom la oficialaj reprezentantoj de Viŝegradaj landoj ankaŭ pluraj fakuloj. Laborlingvoj estis la angla, la franca, la slovaka, kaj Esperanto. La interpretadon prizorgis profesia entrepreno por interpretado inter la angla, slovaka kaj la franca, por la ceteraj lingvoj kvaropa esperantista teamo.

La konferenco estis dividita je 4 partoj

1. **Kiel praktike estas realigata lingva politiko en EU?**
2. **Kion signifas globaligo kaj ekspansio de la angla por naciaj lingvoj kaj lingva diverseco?**
3. **Ĉu la internacia lingva komunikado povas havi utilon de planitaj lingvoj?**
4. **Formuligo kaj realigo de lingva politiko en Viŝegrad-landoj kiel membroj de EU**

La prelegojn prezentis 19 prelegantoj kaj unu referaĵon oni legis. La plej eminentaj prelegantoj estis la fama sciencisto Robert Phillipson el Danlando (Politiko de kunvivado kun la angla) kaj prof. Hugo Baetens Beardsore el Belgio (Interagado pri fremdlingva instruado inter Bruselo kaj ŝtatoj membroj de EU).

Prelegis ankaŭ reprezentanto de Eŭropa Komisiono, sinjoro Vladimir Šucha, sinjorino Druviete (ekministrino de Latvio) kaj pluraj aliaj. Estis ankaŭ pluraj gravaj lingvaj kaj pedagogiaj teoriistoj esperantistoj: Seán Ó Riain, Michael Cwik, Ilona Koutny, Eva Poláková, Jozef Reinart, Michele Gazzola, Lapo Orlandi, Ranieri Clerici kaj mi.

Okazis ankaŭ viglaj diskutoj. La konferencanoj subtenis la diversajn diskutojn kiuj celis subteni la ideon ke la problemon de multlingvismo en Eŭropo kaj samtempan efikecon oni povas

solvi per neŭtrala eŭropa lingvo kiu ne privilegius iun ajn nacion sed samtempe ebligus efikan komunikadon. Estis aŭdite ke certe estas almaneŭ du ĉefkandidatoj por tia neŭtrala eŭropa lingvo: *Esperanto* kaj la *Latina*. Oni menciis ankaŭ la indonezian kazon en kiu al la simpla malaja lingvo oni aldonis multajn novajn terminojn el diversaj lingvoj kaj nun havas grandan indonezian lingvon.



La konferenco pro tempomanko ne sukcesis akceptigi iun komunan rezolucion, sed ĝi akceptis resumon de la laboro kiun oni sendos al la slovaka registaro, registaroj de la 4 viŝegradaj landoj (PL, CZ, SK kaj HU) kaj al Eŭropa Komisiono.

Mi kredas ke tiu ĉi konferenco prezentas komencon de serioza agado ene de oficialaj politikaj instancoj pri serĉado de kvalita kaj egalrajta lingva solvo en EU. La detala raporto estos grava dokumento kaj helpilo por nia posta agado. Oni havos materialon

indan por prezenti al la nova komisionano de Eŭropa Komisiono pri multlingvismo Leonardo Orban.

Grandiozan laboron efektivigis la esperantistaj samtempaj interpretistoj. Sub la gvido de profesia interpretistino, sinjorino Elisa Kehlet laboris 3 neprofesiaj interpretistoj: István Ertl (Hu), Marteno Minich (Sk) kaj Marek Blahuš (Cz). Ili ĉiuj interpretis tutegale kiel veraj profesiuloj kio estis mirinda pruvo por neesperantistaj ĉeestantoj pri funkciado de Esperanto. Kiam iu parolis en Esperanto tiam la interpretaĵo en la slovaka estis uzata por pivota interpretado al la angla kaj la franca. Do aparta respondeco kuŝis sur la slovaka interpretisto el Esperanto.

Ĉar ĉeestis ankaŭ Georgo Handzlik (kiu legis leteron de Margareta Handzlik al la konferenco), ni eluzis la okazos kunsidigi post la konferenco ankaŭ la estraron de EEU.

Zlatko Tišljar

GRAVA INICIATO EN SLOVENA PARLAMENTO

Prof. d-ro Marko Pavliha
Parlamentano de la Parlamento de Respubliko Slovenio
Ljubljana, la 14-an de novembro 2006

Al la Parlamento de Respubliko Slovenio
s-ro France Cukjati, prezidanto

Al Registaro de Respubliko Slovenio

Temo: Skriba iniciato de parlamentano al la registaro de RS

Estimata sinjoro prezidanto,
Harmonie kun la paragrafo 248 de la agregularo de la parlamento mi sendas al vi skriban iniciaton de parlamentano por la registaro de RS.



D-ro Marko Pavliha

LA INICIATO

Al la registaro de RS mi transdonas iniciaton, ke ĝi proponu al Eŭropa komisiono la establon de nova fonduso por financi eksperimentan edukon por eŭropa konscio en mezaj kaj fakaj lernejoj.

La slovena registaro proponu al Eŭropa Komisiono fondi novan fondaĵon por financado de eksperimenta edukado por eŭropa konscio en mezaj kaj fakaj lernejoj laŭ la jena programo:

1. Daŭro:

La edukado daŭrus unu lernejan jaron, 80 lernhorojn (2 horojn semajne) + 7-taga interŝanĝa vizito al alilanda junulara grupo, kiu edukiĝis per la sama programo.

2. Enhavo de la programo:

- A) 26 horoj (po unu horo por ĉiu ŝtato de EU krom la propra) pri la kulturo kaj historio de ĉiu el la landoj kaj ties kontribuo al Eŭropo kaj la mondo
- B) 38 horoj da lernado de la Internacia Lingvo Esperanto
- C) 6 horoj pri eŭropaj valoroj kaj identeco
- D) 6 horoj pri formoj de diskriminacio kaj batalo kontraŭ ĝi
- E) 4 horoj pri strukturo de Eŭropa Unio

Fine de la lerneja jaro la grupo iras viziti similan grupon en alia eŭropa lando, kiu edukiĝis laŭ la sama programo.



Slovena parlamento

La celo de la lernado de Esperanto estas ebligi kontaktojn kun gejunuloj el aliaj landoj ankaŭ por tiuj junaj personoj kiuj en la lernejoj ne sukcesis lerni fremdan nacian lingvon. 38-hora lernado de Esperanto ebligas al preskaŭ ĉiuj gelernantoj (90-95%) akiri bazajn turismajn konojn de la lingvo.

La posta celo estas iom post iom grandigi la reton en kiu estos urboj kun almenaŭ unu lernejo kun tiaspeca edukado, daŭre aktivigi la kunlaboron inter tiuj urboj kaj kreskigi la eŭropan konscion. En la reton enirus urboj per siaj decidoj kaj oni povus nomi ilin eŭropaj esperanto-urboj (ja kelkaj jam ekzistas).

La slovena registaro povus en la jaro 2008, kiam ĝi prezidos EU-on proponi al la Eŭropa Komisiono fondi novan fondaĵon por stimuli tian edukadon.

La edukadon prizorgus du instruistoj; 1 por Esperanto, kiu devus havi konfirmilon de dua (pli supera) B-grado de la scio de Esperanto, ricevita de landa Esperanto-asocio aŭ de supera edukinstanco, se iu el ili en la lando havas ian formon de esperanto-katedro (ekz. en Hungario, Pollando, Nederlando, Svedio, Slovenio...) La duan parton de la programo prizorgus instruisto de iu ajn studobjekto, kiu faris kroman ekzamenon ĉe pedagogia instanco en sia lando kaj ricevis tiusenkan dokumenton.

Al la konkursoj de la EU-fondaĵo por tiu ĉi edukado povus anonciĝi kiu ajn lernejo aŭ neregistara organizo (NGO), kiu povas prui ke ĝi disponas pri la koncernaj instruistoj.

Por ĉiuj aldonaj informoj vi povas turni vin al sinjoro Zlatko Tišljar, sekretario de Asocio por eŭropa konscio, Besednjakova 1, 2000 Maribor, retpoŝta adreso:

Atendante vian pozitivan decidon, mi kore vin salutas.

Subskribo

Raportis Zlatko Tišljar

ESPERANTA KUIREJO

La 13-an de novembro 2006 oni elsendis la unuan el 6 mallonagaj elsendoj en kroata TV-elsendo „**Hrvatska, dobro jutro**“ – Bonan matenon, Kroatio per kiuj lernantoj pri Esperanto el lernejo Retkovec reklamas Esperanton per internacia kuirado. Tri el la lernantoj partoprenis Internacian Infanan Kongreseton kaj tie lernis pri internaciaj kutimoj. La ceteraj elsendoj aperis en la sekvantaj tagoj en la tempo inter la 7a-9a h.

Spomenka Štimec



ALVOKO DE HISPANAJ FERVOJISTOJ: LERNU ESPERANTON ! KION VI DO ATENDADAS?

La kampanjo pri Esperanto estis vera unikaĵo en nia lando, kiu frapis kaj esperantistojn kaj aliulojn.

Komence ŝajnis ŝerca reklamado, sed poste la reklamado estis "amasa", plurfoje en sinsekvaj tagoj (aŭ nesinsekvaj), sed la plej miriga fakto estis, ke ĝi okazis en "pinthoroj", do la plej aŭskultata tempo kaj krome la plej multekosta.

Oni pensis, ke temas pri ni, sed ni rapide sciigis, ke ne estis tiel. Krome, neniu grupo nacia aŭ internacia, mi pensas, povus esti tiel monhava povi facilanime tiom multe elspezi.

La kampanjo komenciĝis la 7-an de novembro kaj finiĝis la 26-an, kaj estis lanĉita en kelkaj tutŝtataj radi-ĉenoj. Inter la plej gravaj: "Cadena Ser".

Mi parkere memoras ĝin laŭlitere:

- ¿Has visto?, le ha dado el puesto.
- Claro, sabe esperanto.
- Sólo unos minutos al día son suficientes. Esperanto. La lengua del futuro. Aprende esperanto. ¿A qué estás esperando?

TRADUKO:

- **Ĉu vi konstatis? Li ricevis (de li/gxi) la laborpostenon.**
- **Memkompreneble. Li scipovas Esperanton.**
- **Nur kelkaj minutoj potage estas bezonataj. Esperanto. La estonta lingvo.**
- **Lernu Esperanton ! Kion vi do atendadas ?**

Tamen, ni eksciis tion de Toño del Barrio el Madrido pro telefonado al Cadena Ser, ke la kampanjon mendis RENFE (Tutlanda Hispana fervoj-servo). Fakte li mem volis intervidiĝi kun fervoj-respondeculo por plia informado.

Se oni aŭskultas atente, efektive oni povus konkludi ke temas pri tio, sed tio ne estas memevidenta. Ja la sekvanta reklamo pri RENFE sekvas al tiu unua (pri Esperanto).

Aperis poste en la stratoj anoncoj en kiuj legiĝas: "El tiempo es tuyo" (vi mastras vian tempon) kun la subskribo de RENFE kaj Ministerio pri Disvolvigo.

Pri tio vi povas legi ankaŭ ĉe:

<http://www.elconfidencialdigital.com/Articulo.aspx?IdObjeto=9636>

Antonio Rodriges

LANĈO DE EKLABORU.COM



Hodiaŭ, la 15-an de novembro, estas la 5-jara datreveno de la Vikipedio en Esperanto. Por festi, ni decidis lanĉi tute novan retprojekton kiu eble estos same grava por la Esperanto-movado: la retejo **www.eklaboru.com**, kie

ĉiu povos trovi laboron aŭ laboranton per Esperanto, por praktike uzi nian lingvon.

Dank' al la Interreto, nuntempe ekzistas multaj eblecoj labori per Esperanto, ĉar oni ne plu devas esti surloke. Ekzemple, mi povus dungi programiston kiu loĝas en Rusio kaj li laborus rete. Tio estas avantaĝo por mi ĉar lia salajro estus malpli alta ol la salajro de germana programisto ekzemple, sed ankaŭ estus avantaĝo por li, ĉar la salajro ja estus pli alta ol normala rusa salajro. Eklaboru.com tamen ankaŭ faciligas dungi homon por labori loke, ekzemple vartisto kiu instruos Esperanton al infanoj. Tiel gejunuloj povas plibonigi ilian lingvokonon kaj sperti alian landon.

Ni kredas ke tiu estos gravega paŝo por Esperanto ĉar laboro ja estas grandega parto de la homa vivo kaj ĝis nun ĝi estis eble la unika parto kiun oni ne povis fari en Esperanto. Se oni volis dungi esperantiston antaŭe, oni devis havi bonegajn kontaktojn ene de la movado por trovi eĉ nur unu taŭgan kandidaton. Tio ne nur estas temp-malŝpara sed ankaŭ neprofesia kaj malallogas neesperantistojn.

Nun per nia retpaĝaro ĉiu povas interkonatiĝi kaj trovi laboron aŭ laboranton - do vizitu **www.eklaboru.com**, kontribuu kaj ankaŭ informu viajn amikojn!

Laboreme via,

La Eklaboru-teamo

KAEST APUD PRAGO:

ĈI-FOJE KUN LA ĈEFTEMO ESPERANTO KAJ INTERRETO

De la 10-a ĝis la 12-a de novembro okazis en Dobřichovice apud Prago plia el la serio de „Konferencoj pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ – KAEST. La konferencon organizas ĉiun duan jaron agentejo KAVA-PECH de Petro Chrdle. La prelegoj estis dividitaj al du blokoj :

- La temo A (ĉeftemo): LINGVO KAJ INTERRETO
- La temo B: STUDIOJ EL DIVERSAJ FAKOJ

Prelegis multaj fakuloj je diversaj temoj, el kiuj ni menciuj almenaŭ kelkajn:

[Marek BLAHUŠ \(CZ\): Unikodo – Esperanto de Interreto](#)

[Pavla DVORÁKOVÁ \(CZ\): Multlingvaj tradukvortaroj en Interreto](#)

[Alla KUDRYASHOVA \(RU\): Lingvo de reta reklamado kaj marketingo](#)

[Detlev BLANKE \(DE\): Bibliotekoj kaj arkivoj - kelkaj problemoj](#)

[Manfred WESTERMAYER \(DE\): Agendo 21 - Civitana Agado por Daŭrigeblo](#)

La venonta konferenco okazos en novembro 2008, ĉi-foje sen ĉeftemo.



Peter Baláž

Pri nia kongreso...

KONGRESAJ NOVAĴOJ

Junulara programo de EEU-kongreso

Por ke la kongreso de EEU estu vigla, etosplena kaj daŭrigebla, bezonas (same kiel Eŭropo mem) gejunulojn. Pro tio ĉi-jare planatas vasta programo por junaj homoj, kiuj volas eluzi eblecon esperantumi somere: konatiĝi kun novaj amikoj, renkonti jamajn, lerni ion novan, turismi en nova lando, partopreni prelegojn, aŭ simple nur babili, danci, spekti filmojn - amuziĝi.

Por ĉiuj tiuj eblecoj estas preparata programo.

Speciale ni volas informi pri jenaj programeroj:

- „**Flugiloj de malfacila vento**“ – plua el la serio de jam popularaj seminarioj, kiuj instigas gejunulojn iĝi instruantoj de Esperanto (taŭga ankaŭ por plenkreskuloj) – sub la gvido de Irina Gončarova
- **Filmejo** - Ĉiutaga film-projekciado (spektu filmojn en E-o, aŭ subtekstigitaj E-e, ajan tagon – preparatas tuta aro da filmoj – de ĉiuj eblaj ĝenroj kaj devenoj. (filmestro: Marek Blahuš)
- **Prezentoj de laboro de E@I** – junulara organizo, kiu en E-o medio famiĝas per altnivelaj ret-paĝaroj, organizado de seminarioj kaj lastatempe ankaŭ pri eldon-laboro. (Prelegoj, diskutoj, prezentoj de ĉiuspeca agado de la grupo. Gvidas Peter Baláž – E@I-kunordiganto)
- **Karaokeo** – via ŝanco iĝi „muzik-stelo“ – almenaŭ dum tiu ĉi programo, kie eblos provi kanti ĉu esperante, ĉu nacilingve – kaj provi tiel konkurenci al la veraj „steloj“. Se vi ĉiam revis pri admiro de la publiko kaj emas je stelaj manieroj, nepre venu kaj kantigu la salonon.
- **Scio-kvizoj** – pri Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj temoj – en amuza etoso kaj kun valoraj premioj.
- **Eta kurso de masaĝo**- Waldemar Lipovicz
- **Matena gonga terapio**- Lučka Šantl
- **Nokta montmigrado**- rigardado de steloj kaj nokta pikniko-gelernantoj de studenta domo
- **Kaj multaj aliaj...**

Pri aldonaj programeroj junularaj ni aktuale informados ĉe la hejmpaĝo de la kongreso:

<http://www.esperanto-maribor.si/index.php>

Ĝis nun al la kongreso aliĝis esperantistoj el 20 landoj: Pollando, Francio, Rusio, Hispanio, Italio, Portugalio, Ukarainio, Hungario, Svedio, Danio, Belgio, Ĉeĥio, Aŭstrio, Serbio, Britio, Nederlando, Slovakio, Litovio, Svislando kaj Slovenio. Ni atendas vian aliĝilon. Gejunuloj atentu: Se vi aliĝas antaŭ la 1-a de januaro kaj estas malpli ol 25-jara, vi ne devos pagi aliĝkotizon!

Vesna Obradović

E@I SEMINARIO EN BRNO



De la 4-a ĝis la 10-a de novembro organizis E@I kunlabore kun ĈEJ en Brno, Ĉeĥio junularan trejn-seminaron kun la temo „Lingvoj@Interreto“.

La seminarion, kiun finance sutenis EU-programo „Youth“ (Junularo) ĉeestis 23 partoprenantoj el 9 landoj. La programo enhavis tiajn

temojn kiel: kreado de multlingvaj paĝaroj, retaj vortaroj, grafika aspekto de paĝo, administrado de Linux-serviloj, Flash kreado... Post la aranĝo 13 gejunuloj ĉeestis date tuj sekvantan KAEST.

Peter Baláž

POLUDNICA 2007 – KOMENC-JANUARA ARANĜO ESPERANTA EN SLOVAKIO



Renkontiĝo de Esperantistoj - vojaĝantoj kaj turistoj okazos 4.-7.1.2007 en civito Liptovská Ján en Slovakio. Temas pri jam XXV-a ascendo sur montopinto Poludnica, kun bunta kroma programo, ĉefe rilata al vojaĝado (prelegoj, diskutoj, planado – pri per- kaj pro-Esperantaj vojaĝoj, aventuroj). Samtempe la aranĝo estos en Slovakio unua dum la jaro 2007 – dum kiu la E-movado tie festas sian 100-jariĝon.

Pliaj informoj (inkluzive aliĝilo):

<http://skej.esperanto.sk/arangoj.php?lingvo=eo&kio=68&akcia=podujatie>

Peter Baláž

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 6-an de decembro 2006.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Avo Frosto, Zlatko Tišljár, Spomenka Štimec, Peter Balaž , teamo de Eklaboru.com kaj Vesna Obradović

Leterojn kaj komentojn sendu al la sekretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>